
# BONA ESPERO



**Cirkulero 41** por la amikoj kaj subtenantoj
de "Bona Espero" r.a., prezidanto:
s-ino Hedwig Fischer, Gustav-Adolf-Str. 2a
D-48356 Nordwalde, tel. +2573/626

Karaj amikoj kaj subtenantoj, Nordwalde, 95-03-09

jam hodiaŭ mi povas sendi al vi la **financan raporton** de 1994, la buĝetproponon por 1995 kaj la inviton al nia venonta ĉefkunveno. Kiel en la lasta cirkulero mi kore dankas al vi pro la abundaj donacoj, kiuj alfluis en 1994. Ankaŭ en la nova jaro multaj el vi jam pagis. - El nia ĉefkunveno je 1994-12-17 koncize la plej grava: nia ĝisnuna vicprezidanto, **s-ino Barbara BRANDENBURG** el Bonn retiriĝis el la estraro. La ĉefkunveno danke agnoskis ŝian laboron. Pro tiu ŝanĝo, la nova vicprezidanto, **s-ro Bernd SCHÖNBERNER** el Meschede, ne pligrandigis, sed simple kompletigis la estraron. Ni ĝojas, ke nia plej aktiva membro nun ankaŭ havas adekvatan postenon. - La nova statuto kun la proponitaj ŝanĝoj trovis akcepton. Nur la frazparto, ke por vojaĝoj de estraranoj validas rekompensoj (kompreneble ĉiu-okaze nur en formo de donackvitancoj) kiel por profesiaj vojaĝoj, estis strekata, ĉar ĝi povus donu malĝustan impreson. (Ekzemple, por flugvojaĝoj al Brazilo estraranoj ricevis/as neniun rekompenson, eĉ ne donackvitancon.) Mi aldonas jen ekzempleron de la nova statuto. -
La 17an de decembro ni povis saluti ankaŭ **s-inon Adarci FERREIRA**, instruistino de Bona Espero, kiel nian gaston. S-ino Ferreira pasigis plurajn monatojn en Germanujo, por lerni la Germanan kaj por ĝenerale plikleriĝi. Ŝi havis por tio forpermeson de la ŝtato Brazilo. Ŝi raportis, ke la urbo Alto Paraíso donacis plurajn parcelojn da loĝogrundo al Bona Espero. Tie instruistoj el Bona Espero povos konstrui siajn dometojn, sed en aliaj dometoj povus ankaŭ loĝi infanoj por plulerni ĝis la abituro. Tiam la infanoj pro tio ne plu devus vivi en la ĉefurbo Braziljo. Estas ankaŭ malklaraj planoj pri konstruota Esperanto-Centro, sed nia ĉefkunveno emfazis, ke niaj financaj rimedoj ekskluzive servu por la vivtenado kaj klerigado de la infanoj de Bona Espero.
Kiel ajn, laŭ la lastaj novaĵoj el Bona Espero ĉio devos esti repripensata: jes la ŝtata porlerneja organizo, kiu kontrolas la lernejon Bona Espero, lastan jarfinon donis rimarkeblan subvencion por la nutrado de la infanoj, sed intertempe la ŝtato nuligis la organizon, tiel ke la Brazilaj lernejoj, inter ili Bona Espero, ne plu ricevos ion ajn. Tial la buĝeto 1995a laŭ propono de Bona Espero enhavas multe pli altan sumon por nutrado kaj ĉiutagaĵoj; ĉiuj investoj (escepte de la kurenta konekso) estas provizore strekitaj.
Postmorgaŭ Rudolf Fischer (nia trezoristo) denove flugos al Bona Espero kaj restos ĉi-foje 6 semajnojn por sperti ankaŭ la ĉiutagon. Ĉe-loke li kun la Brazilaj estraranoj kaj kun **Ursula kaj Giuseppe GRATTAPAGLIA** esploros estontajn eblojn. Kion ekzemple pri jena ideo: subtenanto, s-ro X, pagas dometon ("domo X") "por si" en Alto Paraíso, por foje ferii tie; dum la cetera tempo en la dometo loĝas infanoj de Bona Espero, por plustudi ĝis la abituro. Nu, ĉu alloga ideo? (Cetere: la instruistoj kompreneble pagus siajn dometojn mem.)
En majo ni atendas freŝan raporton de niaj vizitantoj de Bona Espero. Ĝis tiam, kun koraj salutoj

Hedwig Fischer

Por ŝpari bankkostojn, pagu laŭeble al UEA por la UEA-konto "bone-z",
sed informu nin, por ke vi pluricevu niajn cirkulerojn!
Se nek vi estas UEA-membro, nek UEA havas konton en via lando, ĝiru al jena
poŝtkonto: kontoposedanto "Bona Espero", D-48356 Nordwalde
Konto: 2033 99-465 Postbank Dortmund (bankkodo 440 100 46)